Post multahora vizitado ĉiu enlitigis por ripozi kaj pretigi sin por la grandaj aferoj venontaj morgaŭ, kaj baldaŭ eksonis tra la konstruajo la muĝado de bonaj honestaj Esperantaj ronkoj, sono ĝis nun neniam konata ĉe tiu loko.

Matene ĉiu leviĝis frue kaj pretigis sin por la tagaferoj. Unue la aferkunveno ĉe la "Chamber of Commerce" je la deka horo, pri kiu oni verkis protokolon angle por ke la redaktoro de la "Public Ledger," kiu bedaŭrinde ne estas Esperantisto, povu ĝin legi.

Post la aferkunveno oni tuj rapidis

al la hotelo aŭ al la diversaj lunĉejoj de la urbo—"La Café des Enfants," la "Automat"ejoj, kaj Laktovendejoj, kaj oni eĉ rimarkis unu malgajvizaĝan altan homon eliranta el trinkejo, kun fragmentoj de "freelunch" sandviĉo sur sia kolumo kaj višanta el la lipoj la ŝaŭmon de ia stranga fluido—eble batita kremo.

Post la diversaj mangoj oni reamasigis ĉe la Windsor Hotelo — kies servistoj ne plu forkuris de la stranga aspekto de la alvenintoj—jam "tusinte" kelkajn el ili, kaj trovinte ke ili almenaŭ estas homaj.

Kiam post multe da laboro la loka komitatanoj sukcesis ekirigi ĉiujn samtempe oni kondukis nin al granda truo en la tero kie ni devis malsupreniri laŭ nekalkuleblaj ŝuparoj por atingi strangan veturilon nomata "Levigita Vagonaro." Je kiu stranga pensmainero oni nomas vagonaron kiu rapidas tra truo en la tero "levigita vagonaro" estas afero kiu povas esti facile komprenata nur de Filadelfiano. Post kelkminuta veturado ni alvenis ĉe la "Independence Hall" kie troviĝas multaj interesajoj, inter ili la "Liberty Bell," kiu eksonigis la novajon de la naskiĝo de Usono. Post duonhora "kaŭcukkolumado" je la diversaj tie montritaj, klarigataj de tre ĝentila gvidisto, ni transpasis la belan kvadraton inter tiu konstruajo kaj la oficejo de la "Curtis Publishing Co." tra kiu ni pensis kuri dum kelkaj horoj, sed enirante en la antaŭ-ĉambrojn la belvestita Kerbero sciigis al ni ke antaŭ kelkaj semajnoj oni pro ia stranga kialo koncerne la Milito malpermisis ke iu persono krom la tieaj laborantoj eniru en la laborejojn. Kaj la Filadelfianoj mem tute ne sciis pri tio! Stranga afero! Vere la diroj pri la Filadelfianoj ŝajnas esti pravaj, kvankam antaŭe mi opiniis ke diri ke Filadelfiano estas malrapidemulo estas kalumnio.

Dume la suno okupiĝis pri sia kutila afero ĉe Esperanta Kongreso. Vere, mi kredas, ke se Usona Esperantista Kongreso okazus ĉe la Norda Poluso en Januaro, la neĝoj kaj glacio tuj fluidiĝus, kaj en la spaco de nur kelkaj horoj aperus la vegetaĵoj de la tropikoj, kaj la Eskimoj pereus pro la varmego. Spite tion ni vagadis tra la stratoj, rigardante multajn vidin-

dajojn, pri kiu mi ne povas skribi pro manko da spaco.

Ce la Betsy Ross Domo, la naskejo de la Usona standardo, ni trovis dek milojn da personoj en du ĉambroj ĉiu sep je naŭ futojn larĝa (la ĉambroj, ne la personoj). Tie ankaŭ estis manko da spaco, kaj unu grandkora viro proponis al mi ke ni iru al loko kiu restu nenomita por refrešigi nin, sekve pri la postaj vagadoj de nia anaro via "deponanto ne diras."

Reveninte al la Hotelo, ĉiu tuj purigis de si la polvon de tiuj historiaj lokoj, zorge sparante ĝin por porti al la hejmo, por pruvi al la hejmrestuloj ke li vere iris Filadelfion, ĉar nenie aliloke oni povas akiri tian grandan amason da polvo dum tia malgranda tempospaco.

Je la sesa horo vespere ĉiu rapidis al la mangocambro de la Windsor por la "Barcego." Mirindajo! La ĉambro precize pleniĝis, ĉiu havis sidlokon ĉe la tabloj, kaj ne restis eĉ unu seĝo neokupata. Jus kiam ni estis mangontaj, subite eksonis terura stanbruo en la strato antaŭ la hotelo. Ĉiu eksaltis terurite kaj kuris al la fenesstroj. Jen amaso da stano — kaj tiu opiniigis nin ke la stana tegmento de la hotelo jam falis en la straton, sed, rigardante pli zorge ni ekvidis ke inter la amaso troviĝis kelkaj radoj, tuboj, risortoj, k.t.p., kaj subite aperis el sub la afero kvin objektoj, kiuj tuj sin montris kiel kapojn de nia Detroitano, kiu, kvankam ili promesis ĉeesti, ne ankoraŭ vidiĝis. Tirante sin el sub la amaso ili elprenis el la poŝoj ŝraŭbturnilojn, tordilojn, ŝnurojn, k.t.p., kaj je lerteco kiu montris ke ili jam praktikis multe tiun arton ili komencis kunmeti la diversajn pecojn de la stranga amaso, kaj, jen, post nur kelkaj minutoj aperis aŭtomobileto de la famkonata "flivver" speco, en kiu ili atestis ke ili veturis la tutan vojon el Detroit. Pri tio mi havas mian propran opinion, sed mi tion ne diros ĉar mi volas restigi al mi ilian amikecon.

La kelneroj alportis pluajn seĝojn kaj kunpuisis la jamvenintajn por fari spacon por la novevenintoj, kaj la afero progresis.

Unue mi devas doni al vi neĉestantoj la menuon, por ke vi sciigu pri kio vi maltrafis, ne veninte al la Deka. Jen ĝi estas:

## MENUO

## Bonan Apetiton!

Barco (vera pola betsupo) (sen-brua)
Rostita Bovajo (laŭ la Deka)
Terpomoj Pistitaj (senostaj)
Pizoj (verdaj kiel la Stelo mem)
Salato Zamenhofa
Kremglaciajo Fratamurba
Kafo (nemortiga)
Kompreneble,—kaj por ke la Mēnuo ŝajnu pli longa
Pano (spite la vivprezaltecon)
Akvo (tre forta)
Nenio nun restas por fari krom la buštukuzo
Kaj aŭdi la parolantojn

S-ro Vogel konigis al ni la toastestreron S-ro Hetzel, kiu per siaj kutimaj feliĉesprima maniero kaj ĝentileco bonvenis la ĉeestantojn kaj deziris al ili bonan apetiton. Li ankaŭ klarigis al ni la signifon de la vorto "Barcēgo," sed bedaŭrinde jus tiam la kelnerino alportis al mi la barcon mem, kaj mi tuj tiel interesigis pri tio, ke mi tute forgesis aŭskulti kaj lerni el kiu ĝi estas farita, kaj mi ne povas sciigi tion al vi, kvankam mi povas certigi al vi ke ĝi estas tre bongusta. Se vi scivolemas lerni plu nepre skribu demandon al S-ro Hetzel kaj sendube li volonte klarigos por vi.

Dum kaj post la mangado la toastestro senkompare (por la aŭskultantoj) paroligis la jenajn personojn—se mi forgesas mencii iun, kulpigu la kuiriston, ke li faris tian bongustan mangajon!: S-rojn Dow, Morton, Keyes, Silbernik kaj Simonek, ĉiu el kiuj parolis laŭ sia propra maniero pri temo aŭ temoj, pli-malpli interesaj je la ĉeestantoj, ĝis la toastestro igit lin sidiĝi por ke alia trovu tempon por paroli, kaj la mangantoj kiuj ĝentile haltis la mangadon, povu fari tion por kiu ili venis.

Poste venis la fotografisto kiu ekbrilume fotografis nin, kaj laŭ la kutimo de tiaj estajoj, plenigis la ĉambrojn je malbonodora fumo. Tiu ceremonio finigis la Barcēgon, sed se vi opinias ke tiu komitato lasis nin enlitigi kaj ripozi post niaj teruraj laboroj trapasante la tutan urbon dum la posttagmezo vi tute eraras—tiu amuza komitato ne konas la vorton ripozo. Ili rapidigis nin al la Presser Konstruajo, kie oni prezantis du bo-

negajn teatraojn "Gis la Revido" kaj "Norma Venko," ambaŭ tre bone ludataj, kaj precipe interesa estis la unua, pro la fakto ke la aŭtoro mem estis unu el la aktoroj. Aflanke mi diru ke birdeto diris al mi ke li jam promesis verki alian egale bonan post ne longe.

## Jen la Programo

## GIS LA REVIDO

## Aktoraro

F-ino Minna K. Herman, Germanujo	F-ino Edith Hawn
F-ino Edith White, Anglujo	F-ino Edith Collins
S-ro Nikolaj Koskiski, Rusujo	D-ro A. A. Jones
S-ro M. K. Head, Vendisto	D-ro Joseph H. Noble
John Gray, Hotelestro	S-ro Arnold Vogel
George, Knabo	Francis Knowlan

## NORMA VENKO

## Aktoraro

Percival Jones, Bankisto	S-ro J. Fred Knowlan
Euphemia Jones, fratino kaj dommastrino de Percy	F-ino Margaret A. Maisch
Renée D'Orival, Pariza Korespondanto de Effie	F-ino Marie Knowlan
Mary, Servistino	F-ino Helen Greenstein

La ludado tiel plaĉis al la aŭdantaro ke eĉ kato el unu el la oficejoj en la konstruajo, ekrigardinte en la pordon envenis kaj sidiĝis por aŭskulti la ludadon. Ne multaj teatraoj povas allogi katon, kaj tiu fakto nur montras la lertecon de la aktoroj. Eble Esperanto iom similas al katlingvo, kaj se oni povas tion pruvi li tuj sciigu la fakton al la redaktoro de le Public Ledger, kiu diras ke Esperanto havas nenian lingvan devenon.

Post tiu tre bona amuzajo ĉiu tre volis ripozi, kaj denove eksonis la ronkado de lacigitaj Esperantistoj. Ĉar ĉirkaŭ mia ĉambro troviĝis multaj aliaj okupitaj de Esperantistoj, kaj ĉar mi mem neniam ronkas mi ne bone dormis—sed mi eltrovis mirindan fakton—la Esperantistoj ronkas samlingve kiel homaj estajoj:

Vendredon matene ni denove laboris pri labora kunveno ĝis la tagmezo, kaj tuj kuris al la butikego "Wanamaker" por audi la orgenon ludi "La Espero." La orgeno estas tre granda kaj belsona, kaj la organisto certe montris grandan originalecon je sia ludado de nia amata himno.

Je la unua ni denove ekiris kaj cent da ni enpuſis nin en tramon kiu havis grandecon sufiĉan por almenaŭ kvindek. Kompreneble la tramvoja kompanio tute ne kredis ke spite de la Public Ledger ankoraŭ vivas cent Esperantistoj. Sed tio ne ĝenis nin, kaj post duonhora veturado ni alvenis ĉe granda bela parko, nomita "Willow Grove" (Salikarboreto), kie, post mi sukcesis forpuſi la grasulon kiu dum la tuta veturno staris kun sia piedego sur mia plej dorlotita kalo, mi kun la aliaj rapidis al la diversaj amuzejoj, kaj dum kelkaj horoj eksonis la gaja konata Esperanta ridado, kaj eĉ ridacoj, kiam ia speciale terura sperto histerigis unu el nia anaro. Tro frue venis la tempo por reveno, kaj post kelkminuta freneza serĉado por perditaj junuloj kiun oni fine trovis kie oni ĉiam trovas junulon—ĉe la plej danĝera loko en la parko—ĉiuj suprenrampis sur alian tramon, tiu ĉi foje sufiĉe granda por ke ĉiu trovu sidlokon, kaj rapide la elektra fluidaĵo, reportis nin al la urbo.

Post alia mangado, oni vestis sin per siaj plej belaj vestaĵoj kaj rapidis al la stacidomo por iri al la "Wynnefield Country Club"—mi devas diri ke la plejmulto tion faris, sed kelkaj malrapidemuloj venis pli malfrue, iuj per tramoj, aliaj per aŭtomobiloj, kaj ankoraŭ aliaj per vagonaro kiu alvenigis ilin preskaŭ post la dancado finigis.

Tie oni pasigis la vesperon per dancado, kvankam pro la ankoraŭ varmega vetero multaj preferis danci nur per la "flankpaſo," kaj imitis la orientulon kiu tiel multe amis la dancarton ke li ĉiam dungis dancistojn por danci por ke li mem ne elspezu la necesan energion. En la "malgrandaj horoj" oni kaptis vagonaron kiu reportis nin al la urbo, kaj tiun fojon mi estis tiom lacigita ke eĉ Esperantaj ronkoj ne povis maldormigi min.

Sabaton, post la lasta aferkunveno ni ekmanĝis kaj ankoraŭ unufoje rapidis al stacidomo (preskaŭ mi kredas

ke Filadelfio entenas nenion krom stacidomoj) kaj per "speciala vagono" veturnis al "Valley Forge" (Vala Forĝejo) tre fama loko je Usona historio, ĉar tie pasigis vintron Generalo George Washington kaj lia soldataro dum la Amerika revolucio, kaj tre belega loko, pri kiu mi povus verki tutan libron se tiu mallaborema sentaŭgulo kiu pretendas redakti tiun ĉi jurnalon kaj kiu postulis ke mi verku tiun ĉi historieton ne malpermesus, dirante ke "Mankas Spaco." Malgraŭ tio mi insistas diri ke tie troviĝas la plej alta monteto en la mondo, ĉar mi grimpis ĝis la supro, kaj de tie suprenrampis altan turon de kies supro oni preskaŭ povas vidi la batalojn en Flandrujo. Kelkaj el nia anaro ne kuraĝis suprengrimpi surpiede kaj aĉetis aŭtomobilojn por la veturno, sed alveninte ĉe la supro ili eltrovis ke ili devas redoni la aŭtomobilojn al la direktistoj, ĉar tia estas la stranga kultimo de tiu loko.

Post reveno al Filadelfio iu ekrimarkis ke la Detroitanoj malaperis, kaj enketo sciigis al ni la fakton ke ne eĉ unu el ili iam vidis la maron kaj ke ili "Fordiris" al "Atlantic City" por bani en la maro, kaj eltrovi por si mem ĉu estas vere ke la akvo enhavas salon, kiun strangan aferon oni jam certigis al ili, sed kiun ili ne tute kredis. Unu el ili certigis al mi post lia reveno ke estas tute prave, ĉar li dum la banado englutis kelkajn galoniojn da ĝi. Eble vi rimarkis en la tiamaj tag-jurnaloj artikolojn pri la mirinde granda marforfluo de tiu tago, la kaŭzon de kiu neniu komprenis, kaj nun la kialo estas konata al Esperantistoj, sed ne al ordinara homoj. La sama persono—lia nomo restu nepresita—diris al mi ke la tinlizzieularo intencis dormi survoje en grenkampo, sed tiu sin trovis en "New Jersey" kaj tuj la "Jersej-aj Kuloj" okupigis je siaj kultimaj diablajoj kaj la 4duloj devis rapide forkuri por eviti esti formanĝataj.

Vespere okazis propaganda kunveno ĉe la "Widener Library" ĉe kiu tiu konata Esperanta bonegulo S-ro Hailman faris lumbildilustritan paroladon por la eksteruloj. Pro miaj grandaj penadoj dum la posttagmezo miaj piedetoj tiel piedegiĝis ke mi ne povis ensovi ilin en la ŝojojn, kaj ĉar oni sciigis al mi ke nudpieduloj ne tie ricevos bonvenon, mi devis forresti, sed ĉeestinto certigis al mi ke S-ro Hailman

faris tre bonan paroladon kaj multe interesigis la ne-Esperantistojn kiuj kuraĝis veni. Ni esperu ke pro tio la Filadelfia Societo multe kreskiĝos dum la venonta jaro.

Dimancon matene okazis la Diservo ĉe la Preĝejo de St. Luke kaj la Epifanio. Pastro Smiley faris tre bonan kaj interesan predikon kiun mi sube enpresigas, kaj bonega Esperantista horo bele kantis la himnojn. F-ino Najove Majodeh, soloisto, tre belsone kantis la dudek-trian psalmon.

Oni devas speciale noti la sindemon de la estroj de la preĝejo, kiuj senpage donacis la privilegion uzi la preĝejon por la diservo, kaj ankaŭ rifuzis akcepti la monkolekton, dirante ka la Kongreso akceptu ĝin kiel donacon.

Jen la prediko de Pastro Smiley:

**Kiel ajn multaj estas la promesoj de Dio, en Jesuo estas la Jes.**

II Kor. 1:20.

Kiam la mondo estas dissirata per milito, kaj kiam ĉiuj homaj aferoj ŝajnas esti en senespera fluo, homaro ĉirkaŭrigardas maltrankvile por ia forta rifuĝejo—ia neskuebla rokfundamento, kiun nenia ventego povas disbati aŭ detru.

Je niaj personaj vivoj, ankaŭ, ni estas iam ventjetitaj, per ĉagrenego, per kruelaj malkontentoj, aŭ per la rikoltilo de Morto inter niaj amatoj, kaj ni estas tentataj malesperi.

Kia beno, tiam, aŭdi vocon tra la mallumo, dirante trans la maltrankvilaj akvoj: "Kuraĝu, estas Mi, ne timu." Kiu piediras triumfe sur la maro, kaj premas ĝin malsupren; Kiu ordonas al la koleraj ondoj: "Silentu, kvietigu"; Kiu etendas sian manon fortan kaj kaptas nian tremantan. Tiu suprenlevas nin el la maro kaj kondukas nin en la bonstatan havenon.

Tiu ĉi estas Li pri Kiu la Apostolo Paŭlo skribas: "La promesoj de Dio en Jesuo estas la Jes."

Estas rimarkinde ke la nomo 'Jesuo' kaj la Esperanta certigo 'Jes' estas preskaŭ la sama vorto. Neniu alia lingvo, mi opinias, havas tian signifan koïcidon. Donante estas al Esperanto, kiun ni estimas la kremo kaj la klimakso de ĉiuj lingvoj, por elmontri tiun ĉi sugestian kaj belan identecon. "En Jesuo estas la Jes."

Tia certigo estas komfortega al ĉiuj fidelaj homoj. Homaro ĉiam estas atendantaj oran epokon. La promesoj de Dio estas sonintaj malsupren tra la generacioj, deklarante ke la homaro triumfos eventuale per amo kaj frateco. Al Adamo, Noa, Abraham, Moseo, Isajao, la promeso pri vera venko estis certigata. Fine, tiu promeso efektiviĝis en la plej bona maniero, en vivanta perfekta persono—Jesuo Nazareta, la persona 'Jes' de Dio. Ĉiuj el la promesoj pri vivo kaj libereco, lumo kaj amo, estas plenumitaj, plenumataj kaj plenumotaj per Li.

La preĝanto, genufleksante, kun dolorata koro, povas demandi: "Sinjoro, ĉu ĉio kunlaboras al bono por tiuj kiuj amas Dion?" kaj la responde el la ĉielo estas "Jes—en Jesuo."

Persono, en la mallumo de ĉagrenego, ekkrias; "Cu la sunbrilo de paco kaj amo iam revenos al mia animo?" "Jes," estas la afabla rediro de la Eternulo.

"Cu mi povas venki malbelan kutilon, aŭ persisteman pekadon, aŭ malespereman spiriton?" "Jes, en Jesuo ĉio estas ebla."

"Ree, ĉu la mondo iam vidos ĉiaman pacon?" "Jes, en Jesuo la semo de Abraham ĉiuj nacioj estos benataj; la tempo alvenas kiam ĉiu homosidos sub sia propra vinberujo kaj figarbo, kaj neniu timigos ilin."

Tial, kia ajn estas la sufero nun, ĝi estas la naskdoloroj de nova epoko, de nova raso. Preskaŭ ĉiuj el la grandaj bonfarantoj de la mondo estas suferintaj pro siaj principoj kaj precipi—la ĉefa el ĉiuj, la ĉefa de miriadoj, la Mesio—Jesuo. Li prorigis al si ĉajn homarajn suferojn sur la kruco de Golgota.

Inter nuntempaj suferantoj, ni rememorigas, riverence, nian amatan Majstron—Doktoro Zamenhof.

Li forpasiĝis subite, en la spiritan vivon, je la dekkvara de Aprilo. Lia morto, kiel vi scias, okazis ĉe Varsvio, Polujo. La teruraj kaj kortušantaj spertoj en la milito ĉirkaŭ lia hejmo sendube rapidigis al li la morton.

Ce la entombigo, unu el liaj proksimaj kunlaborantoj, publicisto Leo Belmont, faris longan paroladon je la honoro de D-ro Zamenhof. "En tiun ĉi tombon," li diris, "oni deponas la mortintajn restojn de la granda ho-

mo, sed vivanta estas lia animo, kun ni ĝi ĉiam restos, ĉar senmorta estas lia verko. Inter la multaj kvalitoj de la mortinto, la plej granda estis la modesteco tiel en la privata vivo kiel dum la naŭ internaciaj kongresoj, ĉe kiuj oni aranĝis por li kvazaŭ regan akcepton. Ĉie kaj ĉiam li restadis frankvila kaj modesta laboranto, kaj

ankam tra la tuta mondo li estis konata, li ŝajnis ignori sian gloron. Lia verko, ŝatita de multaj lingvaj eminentuloj, ne estas ankoraŭ sufice komprenata en Polujo, sed proksimigas la momento, kiam Varsovio kaj la mondo komprenos la valoron kaj gravecon de la verko de D-ro Zamenhof por la homaro. Tio estos, kiam ĉe la proksima Kongreso Varsovio vidos, ke el ĉiuj teranguloj alkuras la Esperantistoj por deponi sur la tombon de D-ro Zamenhof kortuŝajn kaj dankajn rememorajojn."

Ni aldiru, la spirito de Jesuo elmontriĝis, ni opinias, en Zamenhof. Sekvu ni tiun saman kuraĝon, tiun modestecon, tiun nelacigeblan fervoron.

Ni, do, en Ameriko havas grandan privilegion kaj devon. La morto de kara D-ro Zamenhof devas inciti nin ĉiujn al eĉ pli grandaj agadoj. Ni montru al la malnova mondo kaj precipe lia dolorfrapita patrujo, jes—lia senigata vidvino Sinjorino Zamenhof, ke liaj noblaj penadoj ne-niam mortos; ke kvankam liaj mortintaj restoj estas en la tombo, la inspiro de lia belega vivo restas kaj restos al ĉiuj generacioj. Lia fido estis granda kaj per ĝi, "li, mortinte, ankoraŭ parolas."

Ni parolu, tial, en ehoj de lia voĉo, por la propagandado ĉien de nia estimata lingvo kaj afero. Precipe por antaŭenpuŝi ĉajn klopodadojn por meti Esperanton en la lernejojn, la kolegiojn kaj la universitatojn.

Tiel, la internacia lingvo plifacile enkondukiĝos en la komercon, la scienco, la vojaĝadon, ĉajn kunvenojn kaj kongresojn internaciajn, kaj ĉajn tutmondajn entreprenojn kiel 'Ruĝa Kruco.'

Ni devas havi la spiriton kaj vivecon de la bravaj pioniroj, subigante malfacilajojn kaj antaŭjuĝojn, kaj puŝante antaŭen al la celo de la plej-supra civilizacio.

Tiu ĉi afero ja apartenas al Dio;

ĝi estas, ni opinias, parto de la evangelio de Jesuo; en Li estas certigo, en Jesuo estas Jes. Ni antaŭeniru venkantaj kaj por venki.

Je la 1.30a, ptm. ni ankoraŭ unufoje ekiris trame kaj rapidis al "Fairmount Park," fama vizitindajo en la antaŭurboj kie okazis la Ekspozicio en la jaro 1876. Ankoraŭ restas kelkaj el la konstruajoj kiujn oni uzis por tiu ekspozicio, unu el kiuj nun estas tre bela kaj interesa muzeo de strangajoj el ĉiuj partoj de la mondo. Bedaŭrinde ni povis pasigi nur dounhoron por rigardi, kiam oni bezonus duonjaron, kaj sekve niaj impresoj pri la loko estas iom konfuzitaj, sed mi esperas iam denove iri Filadelfion kaj, evitinte tiun ageman amuzkomitatton, iri al tiu muzeo kaj resti dum longa tempo sen audi komitatanon kriegi "Venu, venu, jam estas tempo foriri."

Kiel ĉiam ĉe tia kunveno, troviĝis aro da amatoraj fotografistoj, kaj almenaŭ unufoje dum ĉiu kvinminuta periodo unu el tiu stranga gento postulis ke ĉiu staru senmove por esti fotografita. Se al Filadelfio mankos sufice da sunlumo dum la venonta jaro, oni kulpigu ilin, ĉar ili eluzis tiom da ĝi por fari fotografojn.

Post dumejla marŝado inter fontoj, kreskajoj, aleoj ktp., ni alvenis al tramstacidomo kie ni baldaŭ sidiĝis en tramo kiu portis nin tra la belaj vidaĵoj de la parko—naŭ mejlojn ni veturis tra la plej belaj lokoj kiujn oni povas imagi. Oni improvizis Esperantan horon, kies Esperantajn kan-tojn neniu ĝin audiinte povos baldaŭ forgesi.

Sur la oficiala programo sin trovis "Dimancon vespere, adiaŭaj kunvenetoj ĉe la stacidomoj," sed preskaŭ ĉiu rifuzis hejmeniri tiel frue. Ĉu tiu fakto devenas de la amo kiun ĉiu sentis por Filadelfio, kaj pro kiu ili malſatis forlasi ĝin, aŭ de la laciĝo pro la sen-ĉesaj iradoj kiujn tiu agema amuzkomitato trudis al ĉiu, mi ne scias. Certe estas, ke krom kelkaj kies laboro postulis ilian tujan foriron, ĉiu restis ĝis la sekvanta mateno, kiam, kiel aliaj, mi mem foriris vagonare al mia hejmo en la okcidenta ŝtato—ne, mi ne kuraĝas nomi ĝin, pro timo ke iu insultita homo divenu mian nomon kaj eble venu al mia hejmo por mortpafmin. La redaktoro sola scias kiu mi

estas, kaj li ne kuraĝos malkaŝi mian nomon ĉar—mi ne diros kial, sed dum mi restis en la Fratamurbo mi uzis la okulojn. Sufiĉe dirite!

Mensogulo.

### WILL YOU WRITE A LETTER FOR ESPERANTO?

In the Philadelphia Public Ledger of Sept. 10, 1917 the following editorial appeared:

#### Save Them From Esperanto!

"Inevitably the cranks rush in where the sensible hesitate to tread. So we have the grotesque spectacle of the Esperantists, who are linguistically dead and buried and do not know it, taking advantage of the discussion of the need that our men in arms should know foreign languages to suggest that they shall learn Esperanto. Heaven forfend! In times of peace, when the dilettanti who have that kind of brain which leads to the invention of a new language having no literary or national parentage nor hope of fertility in the production of works of art, it is perhaps all very well for those who feel the call to fool away their time Esperanting. There are worse employments and more foolish ones. But in these tense times, when all our educational and other facilities are to be speeded up, to rake up the dry bones of Esperanto on the way to the limbo of Volapuk is an insult to those who speak English, fortunately a world language of some importance, and a worse insult to the French, proverbially indifferent to experiments in other tongues than their own. No; let the boys learn French at the fount at the front. And until they do, any kind of sign language for daily needs will do, rather than to maunder Esperanto or any other mongrel gibberish that masquerades as an international language."

Will you write a nice polite letter to the editor of the Ledger, showing him from your point of view in just what points he is mistaken, and how, and why?

A few thousand such letters descending upon this misguided editor may cause him to think twice before he indulges in any more such "rantings" as the above.

That the editorial referred to was written on account of lack of information on the subject, rather than from a deliberate attempt to belittle the Esperanto movement, is shown by the publication of the following reply—which was sent to the editor among several others,—in the issue of Aug. 18. Its publication shows a fair-minded attitude which could well be imitated by some other papers which have published similar editorials and positively refused us any space for a reply. However, write him just the same.—He says "They'll convert us yet" — let's all pull together and DO IT.

#### THEY'LL CONVERT US YET

Moving Appeal in Behalf of Esperanto from a Reformed Scoffer

To the Editor of Public Ledger:

Sir—As an old New Yorker, who, during my recent visit to your city to attend the tenth congress of the Esperanto Association of North America became so enamored of your live paper as to welcome heartily its entry in New York, I beg leave to reply to the disparaging remarks about Esperanto which appeared in the Public Ledger of late.

Rest assured, sir, that I shall do so in a friendly spirit, for it must be admitted that, *a priori*, your remarks are absolutely logical. Besides, how could I possibly act otherwise, well remembering how much more expressive my remarks were when the study of Esperanto was first broached to me by an old friend of mine?

So you will readily understand why your remarks, strange as they must have sounded to me, have in no wise aroused my anger, but rather a reproach to Esperantists themselves for having been so remiss in their duties as to make such remarks possible in such an enlightened paper as the Public Ledger. You have not sinned—you were sinned against! Had we Esperantists done half our duty a paper like the Public Ledger would gladly have done its bit to arouse the American people not to lag behind the progressive countries of Europe.

When I see what great use Germany is making of Esperanto and how little use we are making of it I am tempted to say to the American

business man: "Go to the ant, thou sluggard; consider her ways, and be wise." For, shortly after the war, when she found herself cut off from the world and determined to give to the neutral countries her version of how the war was proceeding, as well as to give to the world the facts preceding the war, which should make the world believe that she really tried to avoid the war, and that it was the Czar, or Earl Grey, who forced the war upon her, she issued her White Paper, with modern improvements, in Esperanto, and sent it out broadcast to all the neutral countries, by using the services of the ready-made Universal Esperanto Association, for whose services, the services of about 1500 delegates, scattered all over the globe, she pays the munificent sum of two marks a year! For this is the price of the Year-book, containing all the addresses of the delegates, entered alphabetically according to the names of the localities, so that Pekin and Petrograd are about six inches apart.

As soon as I got the first batch of the war bulletins in Esperanto, which bulletins are issued under the auspices of the German General Staff, I sent some of them to the French embassy in Washington, for which I was heartily thanked, and was given a hint that they would like to get it regularly, which request I cheerfully fulfilled. However, in a short time I had the satisfaction of receiving a much nicer and larger assortment of war news in Esperanto. This time they came from La Belle France. And these are being continued until the present day, while the English blockade stopped the German series about two years ago. Of course, the other neutrals in Europe are still getting them. I think that the grotesqueness of the spectacle is by this time waning somewhat.

I am willing to send an Esperanto "key" to any applicant on receipt of a two-cent stamp.

JOSEPH SILBERNIK,  
New York Delegate of the Universal  
Esperanto Association.  
New York, September 13, 1917.

### TO DEVELOP THE INTERNATIONAL MIND

#### An International Creed of Patriotism and Good Will for the Children of All Nations

As many of your readers know, the City of Baltimore has offered a prize for the best Patriotic Creed for the Children of the Nation. Such a Creed will be of the greatest value in helping to make us one people at heart.

Two years ago I printed the following Creed and spread it broadcast throughout the country. Thousands of children in this section have learned it.

"I believe in the God of all nations who ever ruleth all things for His own great purposes. I believe in my country, America, born in the love of liberty and purified in the fires of maintaining it. I believe in her destiny as the great exemplar of freedom; in her honesty of purpose; in her high ideals for the best service of all humanity; a service of which I will be a part and which I will do my best to keep pure.

"I owe allegiance and honor to her flag and constitution before any other earthly interest, and conceive it to be my highest duty to so live day by day a clean and upright life that later on I may be worthy of American citizenship."

At that time it was my thought that every nation should have its own Patriotic Creed and that each should include a phrase of Peace and Good Will to the children of other nations, believing that its effect upon the rising generation and the present one would be very helpful in international relations.

The phrase follows:

"I believe that the Children of all nations should have the freedom which I enjoy and I salute them in peace and good will."

I shall be glad to send my leaflet to anyone interested for a 2 cent stamp to pay postage.

J. W. Hamilton,  
593 Laurel Ave.,  
St. Paul, Minn.

**FOR SALE:—160 Acres of good land in central British Columbia.**  
Inquire of L. R. L. Brown, Cummings, Alta., Canada.

### THE ADVANCE SHEET

A Quarterly, published and edited by  
Julia Goldzier, 26 E. 45th St., Bayonne,  
N. J., U. S. A.

Price 50 cts. a year; \$1.00 for 3 years.

In the interest of Religious and Political  
Advancement, Orthographical Reform and

#### ESPERANTO SHORT-WRITING

La gazeto enhavas gravan departa-  
menton pri la Esperanta Mallong-Skri-  
bo. Nova serio komenciĝos en la So-  
mera Eldono. Iu povas ekldeni Esper-  
anton kaj ankaŭ la Mallong-Skribon  
per tiu Eldono; kaj iu povas daŭrigi kaj  
pli bone lerni tiujn ĉi du temojn se oni  
jam komencis la studadon.

Demandu specimenan ekzempleron.

### SHEET MUSIC

IN

ENGLISH & ESPERANTO

#### WITH KEY TO ESPERANTO

Evening and Morning  
Torn From Each Other  
Save the Boys  
Peace Between Nations  
The Home Place  
The Santa Claus Ship  
A Cruel War  
America's Prayer for Peace  
Too Precious To Lose  
Lay Down Your Arms, Ye Nations  
No Flowers For Me When I'm Gone  
Save United States From Rum  
United States of Europe  
If 'Twas Your Boy or Mine  
Two Songs in One      Each 15c postpaid

A. E. BEATTY, Cardington, O.

# Extra Copies of This Number

We have printed a few  
hundred extra copies  
of this number, which  
may be had while they  
last, at 5 cents each, in  
lots of five or more.

AMERICAN  
ESPERANTIST CO.

West Newton, Mass.

### Do Business by Mail

Start with accurate lists of names we furnish—  
build solidly. Choose from the following or any  
others desired.

Apron Mfrs.  
Cheese Box Mfrs.  
Shoe Retailers  
Tin Can Mfrs.  
Druggists  
Auto Owners

Wealthy Men  
Ice Mfrs.  
Doctors  
Axe Grease Mfr.  
Railroad Employees  
Contractors

Our complete book of mailing statistics  
on 7000 classes of prospective customers free.

Ross-Gould, 814 Olive Street, St. Louis.

**ROSS-GOULD**  
Mailing  
Lists St. Louis



## La Emerson-a “Grand”

Stilo B—Kvin futojn, ok colojn

Je grandeco, la perfekte simetria “Grand” por  
la apartamento aŭ ordinara muzik-ĉambro.  
Pri tono kaj kvalito, elmontranta la amplekson  
kaj sonorecon de “Concert Grand.”

Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj

*Petu Katalogon*

EMERSON PIANO COMPANY  
Boston, Mass.

(Fondita 1849)